# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

**Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**
**kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ**

**Només una paraula:**

**RIPOLL**

(Vegeu la pàgina 83 i l'anunci final de la coberta).

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1933 N-ROJ 198-199

Hi ha una manera indirecta de protegir la
**Federació Esperantista Catalana:**
Comprar les coses que ella patrocina.

## Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

## Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 llibrets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de descompte.

## Zamenhof-disko

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5è Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto. (Esgotat).

Curs complet de la

## Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

(En premsa)

Adreceu-vos a

CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA

SEPTEMBRO - OKTOBRO 1933 N-ROJ 198-199




# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:
Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:
València, 245-BARCELONA

## DESPRES DE LES PARAULES VÉNEN ELS FETS

Som tan utopistes com ho puguin ésser molts dels esperantistes, però el nostre utopisme el diferencia dels altres una modalitat que s'assenta sobre el catalaníssim aforisme "Tocar de peus a terra." Es potser per aquesta raó que la KEF —segons el parer dels esperantistes que tenen aquella altra mena d'*utopisme*— no fa res, perquè té uns Reglaments massa curts i per ells no pot organitzar seccions esperantistes d'atletisme, fútbol, natació i caça... de papallones verdes. Tampoc la KEF no convoca els grups perquè constitueixin comitès i delegacions per a coses de pura propaganda espectacular, no edita uns segells apropiats per a ésser enganxats a les portes dels *waters* dels ferrocarrils... en fi, no acabaríem de enumerar els retrets que ens fan des de les pàgines d'alguna o altra revista esperantista, lingüísticament confusionista.

Ara ens ha sortit al pas una d'aquestes revistes lingüísticament confusionistes, que d'un temps ençà neixen a Barcelona, la qual, després de dir que cal crear un esperantisme revolucionari, proclamar la lluita de classes, fer despertar els treballadors que dormiten inconscientment en els rengles de les Federacions i grups neutrals, on són obligats d'escoltar poesies corprenedores d'algun capellà i aguantar un discurs d'algun que altre *ossut* pacifista, es permet dir que l'esperantisme neutral es va passar la dictadura fent jocs florals, mentre ells eren perseguits, empresonats, exilats i vexats.

No creiem que sigui indispensable contestar des d'aquí tota

aquesta literatura inserida en aquella revista esperantista, que si per cert té molta difusió en un districte determinat de Barcelona, la Federació, de la qual n'és l'òrgan oficial, ja s'ha apropiat de tota la nostra Península i de l'Amèrica llatina. Davant tanta immensitat ens declarem impotents.

Ara que ens perdonin els nostres lectors si ens hem apartat de la matriu que el títol d'aquest petit article pretenia d'emmotllar. De totes maneres no ens sap greu d'haver fet una *lliçó de coses* per a molts esperantistes, que abans que ells sabessin en quina part del nostre planeta es trobaven, la Federació Esperantista Catalana ja havia fet *coses*. I vet ací com de les *coses*, que tot fent jocs florals varen ésser parlades al passat Congrés de Vendrell, en vindran els *fets*, gràcies al nostre mai repetit lema: "Utopistes? Sí, però tocant de peus a terra."

En una de les sessions de treball de Vendrell es va aixecar un *samideano*, l'amic Chaler de Terrassa, i va dir que calia anar a la solució d'un problema agudament sentit per molts professors catalans d'esperanto, els quals, davant la manca d'una bona gramàtica en català, es veien precisats d'usar altres llibres en llengua castellana, dolents en la seva majoria i infringint, en adoptar-los, un greuge a la més elemental ètica esperantista del bon català. Hom li va respondre que aquest afer ja feia temps que preocupava a la KEF, la qual darrerament ja havia mig resolt l'aspecte financer de l'empresa, però mancava l'individu que, reunint la competència necessària, portés a bon terme l'elaboració del llibre desitjat. Espontàniament un home, el conegut autor de la Kataluna Antologio, es va aixecar i va prometre fer una gramàtica en un termini curtíssim de temps. Fa dos mesos que la gramàtica està llesta, i mentrestant hom espera les matrius de linotip en esperanto, demanades als Estats Units, l'amic Grau ha enllestit un extens vocabulari esperanto-català, el qual vindrà a arrodonir el llibre, que des d'ara podríem anomenar amb el nom de: CURS COMPLET DE LA LLENGUA AUXILIAR INTERNACIONAL ESPERANTO.

Aquest és el primer acord adoptat en el citat Congrés i, com podeu veure, no sols estem a punt de realitzar-lo, sinó que anem en camí de *superar-lo*. El segon, dels quatre acords que destacaren a Vendrell, fou d'organitzar quatre cursos de en quatre poblacions diferents. Doncs bé, fins avui n'hem celebrat dos a Barcelona, dos a Manresa, un a Terrassa i un que el dia 24 d'octubre acabarà a Girona. Es quasi segur l'organització d'un curs a Vic i un altre a Ripoll, la localitat del nostre vinent Congrès.

El tercer acord fou de demanar per a Barcelona la celebració d'un Congrès Universal d'Esperanto. No sols s'ha fet la petició formulària a l'organisme dirigent de Ginebra, sinó que el dia 20 d'octubre tinguérem una entrevista a Barcelona amb el Director

del moviment esperantista, senyor Robert Kreuz, el qual ha vingut a la nostra Península per tal de resoldre sobre el terreny les dificultats que es podrien presentar en l'organització del Congrés Universal a Barcelona.

I el quart dels acords esmentats, la celebració del pròxim Congrés a la magnífica vila de Ripoll, amb la nota que més avall inserim en constatareu la bona marxa.

DESPRES DE LES PARAULES VENEN ELS FETS, hem dit al començament. Ara, en acabar d'escriure aquesta mena d'EDITORIAL, voldríem saber què hi diuen els que encara gosen a dir que fem política tot fent jocs florals, i com que nosaltres no els deixem fer la seva de política, funden noves revistes i creen federacions amb noms fantàstics, portant al moviment esperantista unes inquietuds, que tenen el seu camp apropiat en la vida no-esperantista. No volem pas que s'identifiquin amb la nostra tasca, però sí els demanem que ens deixin fer la nostra via. Que tinguin envers nosaltres la mateixa tolerància que regna entre els membres de la KEF, on hi ha individus que simpatitzen i militen en partits—potser ara que vénen eleccions fem malfet de dir-ho— tan diferents com la Lliga i l'Esquerra, passant per tots els altres matisos, i deixant d'enumerar els molts comunistes i anarquistes que hi ha entre els rengles dels nostres federats. Per ara, la densitat del nostre moviment no permet encara el *luxe* de dividir-nos i atacar-nos mútuament. Els que no ho creguin així, ells sabran la responsabilitat que contreuen.

EL NOSTRE PROXIM CONGRES

## RIPOLL, LA VILA HISTORICA CATALANA

Han començat ja d'una manera activa els treballs de preparació i organització de les diades esperantistes, que amb motiu del XVIIè. Congrés Català d'Esperanto, la Federació Esperantista Catalana celebrarà per l'any vinent a Ripoll, la vila-bressol de la nació catalana.

El dia 1 de novembre, alguns membres del Consell Directiu de la KEF, acompanyats d'altres esperantistes de Barcelona i Vic, faran la primera visita oficial a Ripoll, on, d'acord amb la digna Corporació Municipal d'aquella vila, es constituirà el Comitè Organitzador del Congrés i jocs florals esperantistes. També hom formarà el cartell amb la primera llista de premis dels *XVI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj*, la *Alvoko* dels quals caldrà tot seguit fer publicar en la premsa mundial esperantista.

ESPERANTISTES CATALANS! — Prepareu-vos a assistir al nostre pròxim Congrés Català d'Esperanto a Ripoll, on, gràcies a ell, podrem encendre un nou fogar esperantista, a semblança de Vendrell, Vic, Manresa, Girona, etc.

# XXV UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

*Kolonjo, 29-a de julio 5-a de aŭgusto 1933*

Oni tiom multe parolis kaj skribis pri la cirkonstancoj specialaj de la nunjara kongreslando, ke mi dum kelka tempo dubis ĉu resti hejme aŭ sperti propraokule kio efektive okazos en Kolonjo dum la Jubilea Kongreso. Mi ĝojas, ke mi venkis la pesimismon kaj povis ĝui la belajn kongrestagojn apud la ĉarma Rejno.

Post kelktaga restado en Parizo, kie mi ĝuis la kuneston de la bonhumoraj francaj esperantistoj en Kafejo Voltaire, la kunvenejo de la redaktoroj de "La Pirato", kun la franca karavano mi ekveturis al Kolonjo. La karavanestro, Sro. Petit, pruvis sian grandan organizan kapablon kaj danke al lia neelĉerpebla laboremo la tuta vojaĝo agrable disvolviĝis.

Alveno kaj disiro al la hoteloj. En la stacidomo diversaj gesamideanoj en provizora informejo donas detalojn al la alvenintoj. Mia hotelo staras je kelkaj metroj de la fama katedralo. Antaŭ mia fenestro la altaj turoj majeste gardostaras kvazaŭ la tuta urbo alkroĉiĝus al ili por protekto. Mi baldaŭ spertis ke la proksimeco de tiuj gardostarantoj estas danĝera: dum frumateno la sonoriloj bruas terure kaj pelas vin el la mola lito. Sur la stratoj granda ordo kaj pureco. Ĉe ĉiuj fenestroj, floroj, floroj kaj floroj. Kaj ĉe ĉiu paŝo homoj en la bruna ĉemizo. Jen la bruncemizuloj kun militistaj kantoj kiel aŭtomatoj marŝas sur la stratoj. Flagoj kun la hokokruco flagras ĉie.

Sur la dekstra bordo de Rejno, apud bela parko, staras la grandegaj foirpalacoj de Kolonjo. Tie estis instalita la kongresejo kun la diversaj kongresaj fakoj: poŝtejo, librejo riĉe starigita de "Heroldo", informejo, monŝanĝejo, ktp. Krom tio en la sama palaco ni havis plej diversajn ĉambrojn por kunsidoj kaj fakaj kunvenoj, kaj grandegajn salonojn por la Somera Universitato kaj por la laborkunsidoj de la Kongreso.

La Solena Malferma Kunsido okazis en la malnova festodomo Gürzenich. Ĉirkaŭ 900 geesperantistoj el 32 nacioj ĉeestas. La orgeno ekludas la germanajn himnojn. La ĉeestantaro stariĝas kaj multaj germanoj levas la dekstran brakon laŭ la nova germana kutimo. Ĉirkaŭ la salono pendas diversaj naciaj flagoj kaj super la prezidloko oni vidas la germanan, la nacisocialistan, kaj en la mezo, grandan esperantan flagon. Sro. Warnier, la prezidinto de la XXIV. en Parizo, faras spritan paroladeton kaj proponas kiel prezidanton s-ron. Behrendt, la gvidanto de GEA, kiu stariĝas sub tondra aplaŭdo kaj faras belegan festparoladon, kies enhavo precipe celas la neesperantistan mondon. Ni citu lian aserton, ke esperanto postulas respekton al ĉiuj lingvoj, kiujn oni pli bone konas kaj amas kiam oni fariĝas esperantisto kaj krom tio, dank'

al esperanto, la rajtegaleco de ĉiuj naciaj lingvoj estas garantiita. Sekvis paroladoj de Dro. Vogt kaj de Dro. Riesen, la urbestro de Kolonjo. Li alparolis la ĉeestantojn en germana lingvo. La paroladon tuj poste tradukas sro. Kreuz kaj, dank' al tio, ni informiĝas pri la bonvenaj vortoj de la urbestro en bruna ĉemizo kaj pri lia ĉefa celo pravigi la germanan revolucion, kiu, laŭ li, savos la mondon de la bolŝevismo. Li petis la gastojn disvastigi tra la mondo kion ili vidis kaj vidos en Germanujo. Tiun peton ni aŭdis plurfoje dum la Kongreso, sed ne por tio la esperantistoj vojaĝis al Kolonjo, sed por vivi kelkajn tagojn de esperantista vivo kaj revidi malnovajn geamikojn el diversaj landoj. Krom tio, oni ne facile povas juĝi iun landon en la daŭro de kelktaga plezurvojaĝo. Mi vidis multajn homojn en la bruna ĉemizo, virojn kaj kelkajn virinojn, kaj ĉarmajn infanojn ankaŭ. Tiuj infanoj marŝis laŭ militista ordo kun kantoj kaj flagoj. Tio eble estas tre germana kaj patriota sed tre danĝera. Kaj ni ne parolu pri niaj judaj gesamideanoj, kiuj ne plu ricevas laboron.

Nu, ni revenu al la temo. La konata hungara poeto Julio Baghy verkis por la XXV-a. belan poezion, kiun deklamas dolĉe kaj kortuŝe ĉarma knabineto. La spirito de la majstro tuŝas nian koron dum la belaj strofoj milde fluas el la lipoj de la blondulineto. Tondra aplaŭdo dum multaj batalantoj viŝas larmojn.

Sekvas la salutparoloj de la reprezentantoj de la esperantistaj organizaĵoj. Unue salutas Sro. Stettler, la prezidanto de UEA, kiu parolas pri la 25-jara jubileo de la Asocio. Tuj poste salutas la diversaj naciaj reprezentantoj kaj ni parolas pri la longjara silentado de la kataluna reprezentanto kaj invitas la esperantistojn al la Kongreso de Barcelona en 1935.

La sekretario, Sro. Kreuz, legas diversajn saluttelegramojn kaj la prezidanto fermas la kunsidon. La orgeno ekludas nian himnon kaj ĥore kantas ĉiuj ĉeestantoj.

En la Ruĝa Salono de la Kongresejo okazis la prelegoj de la Somera Universitato, kiun malfermis Prof. Dro. Giorgio Canuto, direktoro de la Jurmedicina Instituto de la Universitato de Torino. La nunjara Somera Universitato ne havis multajn prelegojn. Krom Dro. Canuto, kiu ĉe la malferma kunsido improvizis paroladon pro manko de Dro. Perrenoud, parolis antaŭ tre granda nombro da ĉeestantoj Dro. Vogt el Stuttgart pri "La financa krizo kaj ĝiaj originoj" kaj Prof. Collinson el Liverpool pri "La metaforoj en la internacia helpa lingvo".

Nunjare ni ne havis la valoran helpon de Literatura Mondo por la aranĝo de la Literatura Vespero sed tamen niaj kolonjaj amikoj sciis solvi kontentige la aferon kaj prezentis antaŭ grandnombra ĉeestantaro kelkajn versaĵojn kaj trafajn ĉapitrojn el la verkoj de kelkaj konataj verkistoj. Ĉio bone disvolviĝis dank' al la multvalora helpo de Sro. Teo Jung.

Plej diversaj fakaj kunvenoj okazis dum la kongressemajno. Mi ĉeestis neniun. La kunvenoj de KR aŭ UFE kun UEA estis tiel oftaj kaj longedaŭraj, ke mi ne nur ne havis okazon ĉeesti iun fakan kunvenon, sed la urbon mem mi nur de la alta kongreseja turo, kie okazis la kunsidoj, povis rigardi dum paŭzoj.

La Laborkunsidoj de la Kongreso en la Granda Kongressalono estis tre multe vizitataj, multe pli ol dum antaŭaj kongresoj. Mi ja ne povas raporti pri la multaj diversaj aferoj en ili pritraktitaj. Pri ili bonege raportis Heroldo de Esperanto, kiun mi rekomendas. Sro. Kreuz raportas pri la agado de ICK dum la lasta jaro. Nur dank' al la organiza kapablo de nia Direktoro oni povas kompreni, ke diversaj aranĝoj povis bone sukcesi malgraŭ la terura krizo, kiu ankaŭ sur nia kampo fosas sub la piedoj. Li prezentas la agadon sur la kampo de radio kun 2308 radiodissendoj en diversaj landoj, li raportas pri la eldono de oficialaj poŝtkartoj kun teksto en esperanto en Hungarujo kaj Liechtenstein, kaj pri la ŝlosiloj, nun en 26 lingvoj. La Gazetara Servo ne estis kontentiga pro manko de financa bazo. Sro. Schoofs, la prezidanto de KR, raportas pri la agado 1932-33 kaj akcentas la laboron plenumitan por la unuecigo de la movado, el kio rezultos multe pli praktika laboro. Li priskribas la paŝojn faritajn tiucele kaj dankas la kunlaboremon de Sro. Stettler, kiu ebligis la ellaboron de la Interkonsento de Genevo. La ĉeestantaro substrekas aplaŭde ĉiun aludon al la definitiva unuecigo. Diversaj fakuloj raportis pri siaj fakoj kaj kelkaj kongresanoj faris sugestojn kaj proponojn. Estas rimarkinde, ke ĉiuj laborkunsidoj akurate komenciĝis, kaj ke la kongresanoj amase ĉeestis.

La ekskursoj kaj amuzaj kunvenoj estis nova sukceso de la Kongreso. La ekskursojn tre lerte gvidis la kongresogvidantino, Sino. Gernsbacher, la animo de la tuta Kongreso, kaj la amuzan flankon ne malpli lerte disvolvis la humorplena kongreskomitatano, Sro. Fritz Kurth. La tuttaga ŝipekskurso sur la Rejno al Sepmontaro altiris ĉiujn kongresanojn. Belega rivero, belegaj bordoj de Rejno kaj belegaj kongresaninoj. Dum la ŝipo majeste glitis sur la trankvilaj akvoj de la fabela Rejno, oni kantis, oni dancis, oni kisis. Sudanoj ne komprenas kiel oni povas tiel facile kisi. Eble la klimato faras tion ke niaj kisoj estas fajraj, pasiaj kaj danĝeraj. Kongresaninoj, gardu vin de la kiso de sudano! Jen sur la maldekstra bordo la fama Universitata urbo Bonn, kie naskiĝis Beethoven. Sepmontaro kun diversaj kasteloj plenaj de legendoj siluetiĝas sur ambaŭ bordoj. Belegaj pejzaĝoj. Ni elŝipiĝas en insulo Grafenwerth kaj tagmanĝas en Honnef. Posttagmeze oni faras diversajn ekskursojn. Multaj iras al la Draka Roko, kie Sigfrido mortigis la drakon, laŭ la legendo. Vespere, je la naŭa, ni ĉiuj reenŝipiĝas en Königswinter. Nun la ŝipo iras kun la fluo kaj ĝi rapidas pli multe ol dum la mateno. Sur la ŝipo oni sidas ĉirkaŭ tabloj kaj la kantoj kaj balanciĝado laŭ la germana

kutimo ne ĉesas. Belega tago, kiu longe rememorigos al ni la Rejnon. Ankoraŭ multaj aliaj ekskursoj kaj vizitoj okazis kun sukceso.

La rejnlanda Vespero en la urba festodomo "Gürzenich" estis la plej trafa aranĝo de la Kongreso. Mi ne povas ĝin priskribi. Tiom multaj novaj aferoj aperis antaŭ niaj okuloj kaj tiom da humoraĵoj fluis el la lipoj de la festestro Sro. Kurth de la 20.30 ĝis la 2-a postnoktomeze, ke verdire mankas vortoj por laŭdi la organizintojn kaj kunlaborintojn. Kun Sro. Kurth prezidas la feston la prezidanto de la plej fama Kolonja karnavala societo, Sro. Maass, kiu pruvas sian majstran talenton por ridigi la ĉeestantojn. Sur la estrado blovorkestro ludas diversajn marŝojn. La programo konsistas el kantado, dancado kaj amuzaj paradoj de pitoreskaj trupoj, kiujn lerte disvolvas fama kantistino Herwig el Kolonjo, Steinbachbaledo, 5 Rheinwellers kaj korpusoj de soldatoj en tipikaj kostumoj, kiuj faras plej ridigajn mallertajn paradojn kaj dancojn. Ankoraŭ multaj aliaj aktoroj forgesigas al ni kapdolorojn kaj la tempo rapidege pasas. La blovorkestro ludas kelkajn melodiojn el la Kongreslibro kaj ni entuziasme kantas la Rejnlandajn kantojn. La prezidanto ordonas, ke ni dancu kaj ĉiuj obeas. La danco fariĝas laŭ la Rejnlanda maniero. Jen brak-enbrake ni ĉiuj balanciĝadas, jen ni turniĝas kun manoj super la kapo kaj ridegas kaj ridegas. Eble la konata vino el Rejno estas la plej taŭga kunlaboranto. Sro. Kurth diras, ke la festo estas eta ekzemplo de la Kolonja karnavalo, kiu daŭras kelkajn semajnojn. Gajaj homoj la kolonjanoj. Certe ni neniam forgesos la amuzegan vesperon.

Festeno, balo kaj ankoraŭ nova Rejnlanda Vespero en la sidejo de la Kolonja Grupo okazis. Ĉie mi vidis grandan nombron da partoprenantoj.

Ĝardenfeston kaj Jubilean Festkunsidon aranĝis UEA por solene festi sian 25-jaran ekziston. Paroladoj de diversaj eminentuloj, Behrendt, Vogt, Karsch, Jakob kaj Stettler, kiu eldiras belan festparoladon, dum kiu li skizas la grandan taskon plenumitan de UEA kaj esperas, ke en baldaŭa tempo novorganizo kunigos nin ĉiujn en ĝi. Oni legas versaĵon de Kolomano de Kalocsay "La kapitan' el Berno", bela kanto al la brava prezidanto de 'UEA.

La plej grava tasko de la Jubilea Kongreso certe estas la fina solvo de la reorganiza demando. La reprezentantoj de la naciaj societoj kaj tiuj de UEA parolis multajn horojn en Kolonjo. Blovis ventego dum la unuaj kunsidoj, en kiuj oni revivigis jam forgesitajn epizodojn. La kongresanaro tiel evidente esprimis dum la laborkunsidoj, ke la unuecigo de la movado estas tiel necesa, ke fine la reprezentantoj fariĝis cedemaj kaj nur lastmomente oni povis stariĝi por aplaŭdi entuziasme la finan diskutadon. Ni esperas ke sur la bazo de la nova interkonsento nia afero trovos pli bonan vojon por la disvolviĝado.

Kaj jen la Ferma Kunsido kun sennombraj ovacioj. Disdono de medaloj, paroladoj, dankado kaj kisado ankaŭ. Dro. Vogt kiu anstataŭas la prezidanton de ICK, sciigas la kongresanaron pri la praktika sukceso de la Kongreso, tio estas, la fina interkonsento de UFE kaj UEA. Sro. Schoofs legas la tekston (legu ĝin sur la sekvantaj paĝoj [1]) kaj solene oni subskribas ĝin. Sino. Gernsgacher, kiu tiel modele gvidis la Kongreson kun emocio dankas la grandan ovacion de la kongresanaro. Jen la strofoj de "La Espero" kaj nova Kongreso apartenas al nia historio. Ni ĉiuj longe vivu por travivi multajn aliajn ankoraŭ.

S. ALBERICH JOFRÉ

1 *Pro manko de loko ne aperos ĝis la proksima nro. Red.*

## PAROLADO DE LA PREZIDANTO

### DE LA XV-aj. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ EN VENDRELL

Kun la plej granda emocio, jen mi staras kontraŭ vi, ludante la prezidantecan rolon en ĉi-tiu bela festo, la plej grava kaj plej efika por la propagando de nia idealo.

Kun la plej granda emocio mi ekstariĝis, ĉar kiam mi returnen ĵetas mian atenton kaj mense elvokas la bildojn kaj la nomojn de la eminentaj esperantistoj, ludintaj la prezidantecan rolon en la pasintaj Floraj Ludoj, mi tute konfuziĝas rimarkante la sensignifecon de mia persono, kompare kun la klereco nobeleco kaj alta signifo de la nomoj de miaj antaŭuloj. Pro tio, en tiu ĉi momento, granda konfuzo malklarigas mian penskapablon, ĉar en mia cerbo aperas la dubo ĉu tiel malgraviĝis la esperantista movado, ĉu ĝi tiel malabundas je kleruloj, ke nur pro tio fariĝis ebla la elekto de mia nomo por tiel grava kaj honoriga ofico.

Tamen, gesinjoroj, nun mi vidas min ĉirkaŭita de multenombraj, meritplenaj samideanoj, pri kies nobeleco kaj klereco neniu povas dubi. Ĉiu el ili povus prezidi ĉi-tiun feston pli rajte ol mi. Aliflanke, ni ĉiuj povas konstati ke nia movado en Katalunujo, malgraŭ la malfacilaĵoj travivitaj dum la lastaj tempoj ,ne nur konservas siajn posiciojn, sed ankaŭ rimarkinde antaŭeniras kun la ĉiama fervoro kaj entuziasmo.

Mi konkludas, do, ke ne miaj meritoj altigis min ĝis la prezida seĝo de la Juĝantaro, sed nur la bonvolemo de la pioniroj de nia literatura esperanto-movado, kiuj tro alte taksis miajn klopodojn, mian deknaŭjaran laboradon por nia sankta idealo.

Floraj Ludoj! Jen denove ni, malnovaj amikoj, reprenas la ĉiujaran poezian komunion. Jen denove ni, amantoj de beleco, revenas por aklami la belecon enkorpiĝintan en ĉarma virino sidanta

sur trono. Jen denove ni, post jaroj de premado, libere rekunvenas por avide aŭskulti niajn poetojn, reagordiĝintajn siajn lirojn, kiam ili kantas, per novaj rimoj, la idealon.

Floraj Ludoj! Jen la festo de nia kataluna esperantistaro. Ĝi, ĉar estas kataluna, soifas por trinki la nektaron de beletristiko kaj poezio, precize en Floraj Ludoj, tiel enradikiĝintaj en la historio de Katalunujo; kaj, ĉar ĝi estas esperantista, ni deziras ke en Esperantujo ankaŭ enradikiĝu la Floraj Ludoj, kun la antaŭscio kaj plena certeco ke, tiel same kiel en Katalunujo la Floraj Ludoj estis la plej efika ilo por veki la patrujan konsciencon per kiu nia lando ĵus atingis liberecon, en Esperantujo ankaŭ la voĉo de la poetoj en similaj festoj sukcesos altiri la homaron al nia sankta idealo de interhoma paco kaj amo.

Jen, gesinjoroj, jen kiel mi forportata de mia entuziasmo alvenis al la temo kiun mi intencas priparoli ĉi-tie: "La enkonduko de Floraj Ludoj en la internacia esperanto-movado".

Ja, en diversaj okazoj, tiu ĉi temo estis pritraktata, sed ankoraŭ, bedaŭrinde, nenio serioze estas farita de l' praktika flanko ekster Katalunujo. Multaj eminentuloj de diverslanda esperantista movado esprimis sian simpation por la Floraj Ludoj. Multaj el ili eĉ partoprenis niajn Internaciajn Florajn Ludojn per sendado de literaturaĵoj, foje premiitaj. Diversfoje la Naturan Floron, la plej alta kaj plej ŝatata rekompenco tial ke ĝi estas la plej honoriga, atingis, kiel nunjare, eksterkataluna samideano. Sed tamen, la Floraj Ludoj ne enradikiĝis ekster Katalunujo. En la plej bona okazo, oni organizis literaturan konkurson; sed tio ja ne estas Floraj Ludoj.

Mi kredas, ke estas jam tempo ke niaj institucioj, ke niaj ĉiulandaj pioniroj, ke nia ĵurnalaro kaj gazetaro tutmonda turnu sian atenton al tiu ĉi nia festo, studu ĝian originon, observu ĝian funkciadon, analizu ĝian organizadon, esploru ĝian spiriton, mezuru ĝiajn rezultatojn, kaj el ilia esplorado kaj studado konkludu, ke ĝia enkonduko en la esperantista movado donos la plej belajn fruktojn, ĉu por stimuli la literaturan produktadon, ĉu por interesigi la esperantistan popolon pri la literaturaj aferoj.

La origino de la Floraj Ludoj estas pure literatura, ĉar ĝi devenas de la publikaj konkursoj de la trobadoroj kiam, same kiel la kavaliroj batalis per mortigaj armiloj, ili luktis konkurence per strofoj kaj poemoj, kiujn ili nomis *floroj*, por la gloro kaj honoro de siaj respektivaj sinjorinoj.

La influema valoro de tiu ĉi poezia festo estis tiel forta, ke ĝi povis konservi inter la popolamaso la sentojn de delikateco, de honoro, de heroeco, de patrujamo, unuvorte, de nobla idealeco, sur kiu baziĝis la kavalireca vivo dum tiu longdaŭra nokto de la mezepoko, kiam ĉiu alta idealo ŝajnis esti tuj dronanta en ondon de barbareco.

Al kio ni katalunoj ja ŝuldas nian aktualan duonliberan staton, kiu, kredeble, faciligos la akiron de plena kaj absoluta libereco? Ĉu ne jam ĉie estas konate la efika kaj decida influo sur la kataluna nacia konscienco, kiun alportis la Floraj Ludoj ĉe ilia restariĝo, post jarcentoj de dormado? Ĉu ne jam estas konsentite ke tio okazis, tial ke la spirito de tiu ĉi festo kuŝas precize en la popolanimo?

Frapinte la poetoj la kordojn de siaj liroj antaŭ la popolo, ili frapis ankaŭ la idealojn dormiĝintajn en la popola koro kaj vekigis en la samnacianoj la volon reviviĝi. De tio devenis tuj la agado, poste la ĵusa sukceso, baldaŭ venos la tuta triumfo.

Nun mi diras. Se oni atente studas la spiriton de la Floraj Ludoj, observas ĝian funkciadon, kaj serĉas la kaŭzon de ĝiaj sukcesoj, oni nepre devas konkludi, ke, por ke la enkonduko de tiu poezia festo en la esperanto-movado estu fruktodona, estas nepre necese ke oni celu, antaŭ ĉio, enigi en la Esperantistajn Florajn Ludojn la popolan spiriton. Oni ne atingos la deziratan rezultaton per simpla organizado kaj kunvokado de literaturaj konkursoj, kun pli-malpli valoraj premioj. Estas antaŭ ĉio necese, ke la popolamaso interesiĝu pri la afero; sed por ke la popolo interesiĝu oni devas krei konvenan atmosferon pere de ĉiuj rimedoj de diskonigado uzeblaj kaj organizi brilan, solenan, pompan feston, kie la popolo povu partopreni kaj kunlabori per sia entuziasmo kaj siaj aplaŭdoj, allogita de la pompo kaj soleno.

Kiam la kunvokado de internacia literatura konkurso, laŭ stilo de Floraj Ludoj, vekos la scivolon de la esperantista popolamaso; kiam en la esperantistaj medioj estos kun intereso komentariitaj kaj estos temo de ĉies konversacio, en rondoj kaj kunvenoj, ĉiuj detaloj de la okazontaĵo; kiam inter la esperantistaro estos priparolataj la anoncitaj premioj, la ebla partoprenado en la konkurso de tiu aŭ alia konata poeto, la nomoj kaj cirkonstancoj de la eblaj kandidatinoj al la reĝina posteno, la kompetenteco de la juĝantaro kaj la nombro de la verkoj ricevitaj; kiam por la festo daŭros ankoraŭ longe la komentarioj pri la valoro de la verkoj premiitaj kaj elmontriĝos la avido legi sur la presita papero la poemojn aŭditajn ĉe la festo. Tiam oni povos esperi abundajn fruktojn de la literatura konkurso kaj esti certa ke oni ne vane faris tiom da klopodoj por la preparo de la festo. Tiam la voĉo de la poetoj havos fortan influon sur la popolajn sentimentojn; pro tio oni povas konjekti, ke ankaŭ sur la esperantista popolo niaj poetoj trovus vastan kampon, kien dissemi kaj kulturi niajn idealojn de paco kaj amo.

*Reĝina moŝto:* *Moŝtaj aŭtoritatuloj:*
*Gesamideanoj:*

Antaŭ ol fini mian paroladon, estu permesite al mi danki ĉiujn por la bonkora aŭskultado.

Koran dankon al vi, ĉarma fraŭlino, rava konkretaĵo de beleco, ĉefa allogaĵo de tiu ĉi festo. Kiam post jaroj la esperantista popolo, kiu vin hodiaŭ aklamas, rave rememoros tiun ĉi okazintaĵon, super ĉiuj rememoroj estos tiu de via beleco radianta de sur trono.

Koran dankon al vi, belegaj korteganinoj ĉirkaŭantaj, kiel florbukedo la reĝinan tronon. Ĉiu el vi meritas tronon, pro via ĉarma allogo, ĉar ĉiu el vi estas reala reprezento de la beleco de niaj katalunaj virinoj.

Koran dankon al vi moŝtaj aŭtoritatuloj, kiuj per via ĉeesto bonvolis aldoni solenecon kaj reliefon al nia sento, pruvinte tiamaniere vian amon al la kulturo kaj simpation al nia ideo.

Koran dankon al vi, ĉeestantaj kaj forestantaj poetoj kaj literaturistoj partoprenintaj nian konkurson, ĉu vi atingis aŭ ne premion. Via efektiva kunlaborado estis la plej kontentiga sukceso por ni, ĉar ĝi pliriĉigis la literaturan trezoron de Esperanto per novaj valoraj juveloj.

Kaj fine, koran dankon al vi, estimataj gesamideanoj. Via ĉeesto kaj viaj varmaj aplaŭdoj, nobla popolo esperantista, estas premio al la peza laboro de la organizintoj. Vi pruvis hodiaŭ ke en Esperantujo ankaŭ la voĉo de la poetoj eĥas skuante la sentimentalecon de la popolamaso. Estu viaj aplaŭdoj kaj viaj aklamoj refreŝigo por nia laboremo, por ke Kataluna Esperantista Federacio baldaŭ kunvoku al novaj Internaciaj Floraj Ludoj.

Ĝis la venonta jaro!!!

Artur DOMÈNECH MAS.

## KLARIGO

En nia lasta numero de KE, sur paĝo 59., okazis rimarkinda eraro, kaŭzita de la kompostito, kiu fuŝis kaj intermiksis la nomojn de du aŭtoroj atingintaj menciojn al la premio IV, de la grupo "Barcelona Stelo".

*Unuan Mencion* atingis la verko n-ro. 37. Aŭtoro: Sro. Joh. Hartog, el Bearn (Nederlando). *Duan Mencion*, la verko n-ro. 40. Aŭtoro: S-ino. Margarete Polier, el Breslau (Germanujo). *Trian Mencion*, la verko n-ro. 52. Aŭtoro: Sro. S. J. Grenkamp-Kornfeld, el Paris.

Ankaŭ sur paĝo 60., kiam oni parolas pri la premio X. de "Literatura Mondo", pro ne bonaj informiĝoj, oni citas kiel aŭtoron diversajn knabinojn, kiuj ĉeestis Ĉe-kurson en Tallin. La aŭtoro de la premiita verko, n-ro. 19, estas F-ino Veroĉka Gutmann, 14-jara s-anino. el Tallin (Estonio).

## BIBLIOGRAFIO

VORTOJ DE PROFESORO TH. CART, al la pacaj kunbatalantoj dediĉitaj de S. Grenkamp kaj R. de Lajarte. Eldonejo "Esperantista Voĉo", Jaslo (Polujo), 1927. e

Unu el la plej grandaj plezuroj, kiujn Esperanto havigis al mi, estis la ofta interkorespondado kun la eminenta gardanto de nia Fundamento, kaj unu el miaj plej grandaj Esperantaj emocioj estis la renkontiĝo kun Profesoro Cart, ĉe la "Londona Esperanto-Klubo", survoje al la Edinburga Kongreso. Mi bone memoras, ke, en improvizita parolado (mi estis ĵus enirinta en la kunvenejon kaj amiko S-ro Bernard Long publike demandis ĉu mi troviĝas inter la ĉeestantoj kaj petis min fari salutan paroladeton) mi asertis ke por mi, postmilita (aŭ dummilita) esperantisto, la ĝojo persone saluti la eminentan pioniron egalvaloras, tiun emocion, kiun la pli malnovaj esperantistoj spertis sentante la personan ĉarmon kaj simpation de D-ro Zamenhof.

Kiam okazis la morto de la amata Th. Cart, la sciigo trafis min kvazaŭ fulmo, kaj mi tute ne kapablis, pro nepriskribebla, psikologia stato, verki nekrologon por "Kataluña Esperantisto", kiun devis urĝe fari amiko Capdevila. En la lastaj monatoj de la vivo de Cart mi estis treege okupata de neesperantaj aferoj kaj lasis sen respondo du-tri el liaj karakterizaj poŝtkartoj. Fine mi skribis al li, senkulpigante min, kaj mi ne scias ĉu mia letero alvenis ĝustatempe por ke ĝi povu almenaŭ esti legata de li, aŭ ĉu ĝi alvenis Parizon en la tago de lia morto... sed la fakto estas, ke al mia letero ne venis respondo. En la lastaj jaroj mi vivis kun la impreso, ke mi ŝuldas ion al Cart, al la memoro de Cart, kaj mi eĉ pentis, ke li eble en iu momento povis juĝi min malĝentila kaj nedankema.

Nu, se mi estus superstiĉa, mi povus esti kredinta, ke mi aŭdas la transtomban voĉon de Cart... ĉar mi ĵus ricevis de S-ro Grenkamp leteron riproĉantan min, pro tio ke mi ne recenzis ankoraŭ la verkon "Pol-Pomeranio" kaj EĈ NE, SIATEMPE, LA VERKON "VORTOJ DE PROFESORO TH. CART".

Mi devas klarigi, ke la recenzo pri "Pol-Pomeranio" aperis intertempe en la lasta numero de "K. E.", kaj la recenzon pri "Vortoj de Profesoro Th. Cart" mi ne faris siatempe simple pro tio, ke mi ricevis ekzempleron persone dediĉitan, sen la mencio "Por recenzo", kaj mi supozis ke la recenzota ekzemplero estos sendata de la eldonejo rekte al la Radakcio de nia kataluna gazeto.

Sed tamen mi volas montri al amiko Grenkamp ke mi ne estas mallaborema —mi okupis per recenzoj kvar paĝojn en nia lasta numero— kaj samtempe mi volas pagi mian ŝuldon al la memoro de Profesoro Cart.

La "Vortoj" de Cart, kiuj certe indas resti gravuritaj en la koro de ĉiu esperantisto, estas klasigitaj sub "Sinforgesemo", "Socia Demando", "Pri Fideleco kaj Reformoj", "Pri Natura Evoluado", "Pri la Lingva Komitato", "Pri la Scienca Lingvo" kaj "Diversaĵoj".

La pioniro de la fideleco al nia Fundamento trafe akcentas tion, ke Esperanto estas ĉefe socia demando, kaj laŭ konvinka maniero montras al ĉiuj esperantistoj vojon saĝan kaj konstruan sintenon. Ĉiu samideano devus posedi la "Vortojn de Cart", kune kun la "Lingvaj Respondoj" kaj la "Fundamenta Krestomatio".

El la "Vortoj" mi aparte ŝatas "Antaŭparolo al iu Lernolibro" (kiun mi tradukas katalunen por nova Esperanto-Gramatiko), "Sur la vojo al Servoz", "Ni respektu nian Lingvon", "Ŝtonigo de Lingvo", "Idola Fori" kaj "Natura Evoluado".

La libro, bonege presita kaj eldonita, kun 140 paĝoj, komenciĝas per "Letero al Profesoro Th. Cart, kiel prologo" kaj finiĝas per "Letero al Sinjoroj S. Grenkamp kaj R. de Lajarte, kiel epilogo", kaj la finaj vortoj de Cart al ambaŭ laboremaj samideanoj "Tutkore, amikoj, mi premas viajn manojn" devas esti ripetataj de ni ĉiuj: Amikoj Grenkamp kaj Lajarte, unuarangaj disĉiploj de la kara formortinto: pro via bela tasko por la disvastigo de l' "fideleco", koran manpremon!

LA VOJO RETURNE, de Erich Maria Remarque, el la germana lingvo tradukita de Joseph F. Berger. Eldonis: "Heroldo de Esperanto", Köln (Germanujo), 1931.

Ankaŭ ĉi tiun libron mi ricevis kun persona dediĉo kaj sen la mencio "Por recenzo"... kvankam tuj post ĝia legado mi gratulis la tradukinton kaj promesis recenzi ĝin.

La tempo forpasis sen tio, ke mi povis plenumi mian promeson, ĉar malfeliĉe nia kara gazeto estas malgranda kaj felice la Esperantaj libroj ĉiufoje estas pli grandaj kaj jen mi nun troviĝas en momento, kiam la vortoj presitaj sur la kovrilo de tiu libro "Ne nur en via libroŝranko, ankaŭ en via koro estu la du verkoj de Erich Maria Remarque", eble vekas alian eĥon ĉe la koro mem de la tradukinto.

Ni laŭdu tiun sentoplenan, poeziplenan libron, kaj ĝian bonegan tradukon; ni laŭdu la autoron, kies alian verkon mi legis nur katalune ("Res de nou a l'Oest"); ni laŭdu la eldoniston; kaj al la tri kunlaborintoj, germanoj, ni esprimu nian simpation.

LINGVO, STILO, FORMO. Studoj. Verkis: K. Kalocsay. Eldonis: "Literatura Mondo", Budapest, 1931.

Ĉi tiu grava libro, 142-paĝa, konsistas el "Esperanta Vortfarado", "La evoluo de nia poezia lingvo", "Sendemandaj respondoj", "La Esperanta rimo", "Esperanta elparolo", "Pri la Esperanta

ritmo", "Klasika metriko en Esperanto" kaj "La mezepoka Esperanto".

Mi ĉiam laŭdis la verkojn de la literaturisto, de la poeto K. Kalocsay. (Mi estas ankoraŭ recenzonta la verkojn "Eterna Bukedo" kaj "Hungara Antologio", kie lia genieco brilas preskaŭ ĉiumomente). Sed en "Lingvo, Stilo, Formo" (trafa kaj tre bela titolo) mi trovas lertajn rimarkojn apud absurdaĵoj.

Mi legis, ke multaj recenzistoj ĝenerale ŝatas la verkon, sed malaprobas detalojn, kiujn ili tamen ne tute precize montras. Al mi okazas same: mi volonte asertas la klerecon de l' aŭtoro kaj la ĝeneralan bonecon de la verko, sed mi ne ŝatas multajn detalojn, kiujn montri bezonus tuta libro. Kaj mi ne havas eldoniston, nek estas ĉiel favorato de l' sorto, kiel Kalocsay.

Mi ne konsentas precipe pri kelkaj punktoj el "La evoluo de nia poezia lingvo" (ĉar kun tiom da liberecoj kaj novaĵoj la unua alveninto povas fariĝi granda poeto) kaj el "Pri la Esperanta ritmo" (Ĉar Kalocsay precipe en tio estas tro dogmeca).

Al la katalunaj esperantistoj kiuj penis traduki aŭ originale verki poemojn, okazas tragedio: oni plej ofte diras al ili, ke iliaj versoj ne konformas al la Esperanta tonakcento... ĉar *oni* ne scias diveni la specialan ritmon uzatan de katalunoj aŭ *oni* ne kapablas kompreni nian spiriton. Oni ne konas la valoron de la *paŭzoj* aŭ *cezuroj*, kiuj ebligas tute korekti la, laŭdire, nekorektaĵojn el ritma vidpunkto. Oni ne konscias ke, apud la rigoreco de piedoj (cetere la diversaj aŭtoroj ne interkonsentas pri la unuforma uzo de piedoj, nek pri la *licencoj* kiujn oni devas enkonduki), rajtas ekzisti malpli markita ritmo; oni ne volas konsenti al ni katalunoj aŭ latinidoj *kelkajn* liberecojn ritmajn kaj oni postulas por si ĉiajn liberecojn en aliaj aspektoj.

Mi ofte revis: se mi povus deklami poemojn antaŭ internacia publiko!

Oni konstatos, ke ĉiu vorto el miaj poemoj estas regule akcentita. Sed mi estas modesta laboranto en angulo de Esperantujo, kaj mi ne havas eblecon —monon, tempon, altrangecon— aŭdigi mian voĉon. Mi ĉeestis nur unu Universalan Kongreson, la Edinburgan, kie mi paroladis, en la kadro de la "Somera Universitato", pri "La Kataluna Popolkanto", sed mi ne kuraĝis peti de la bonvolaj Skotaj samideanoj, ke ili permesu al mi deklamon de poemoj.

Krom kelkaj originalaj amaj poemoj, multaj tradukoj miaj el la kataluna kaj hispana lingvoj kontribuis al la Esperanta Poezio; sed mi timas: ĉu mi daŭrigu mian poetikan laboron por la "Hispana Antologio" kaj por la "Historio de la Trobadoroj Provencalaj-Katalunaj"? Ĉu oni volos taksi, ĉu oni komprenos mian laboron? En momentoj de senkuraĝiĝo mi konkludas: Mi prefere silentu, ĉar en la plej bona okazo mi estos najtingalo el *fremda* arbaro.

J. G. C.

# VERKOJ EN RECENZO

LA SORĈISTINO EL KASTILIO, de *Salom Asch,* el la juda trad. *I. Lejzerowicz;* eld. "Literatura Mondo", Budapest. SERVULRAJTO, de *Invan Cankar,* prilaboris *Jakobo Stefanĉiĉ;* eld. "La Suda Stelo", Slav. Brod (Jugoslavio). LA VOJAĜOJ DE GULIVERO (1.a parto), trad. *Jos. A. de Roos;* eld. Piet Smits, Tilburg (Nederlando). LA MONO DE SRO. ARNE, de *Selma Lagerlöf,* el la sveda trad. *Stellan Engholm;* eld. "Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.", Stockholm. MERKADO LA AZENPELISTO, de *Naum Jeruŝalmi,* el la hebrea trad. *Leono Vienano;* eld. N. Szapiro, Warszawa. KONSILOJ (Sugestoj de malnova esperantisto), de *Andrés Piñó;* eld. "Tip. Moderna", València. *ESPERANTO;* GRAMATICA, EJERCICIOS Y DICCIONARIO, de *Manuel Caplliure Ballester;* eld. "Imprenta de José Olmos", València. BARBRO KAJ ERIKO (Korespondado inter du junaj geesperantistoj —austro kaj svedino), de *Alois Schneider-Magda Carlsson;* eld. "Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.", Stockholm. Kaj de la sama eldonejo, DIALOGOJ KAJ KOMEDIETOJ, de *Einar Dahl.*

## ENLANDA KRONIKO

*Barcelona.* — Pli ol 30 personoj ĉeestis la ekskurson per omnibuso, organizita de la grupo "Paco kaj Amo", al la mirinda "Costa Brava", kie la partoprenantoj ĝuis agrablan sinbanon en la naturaj *salaj* lagetoj, starantaj inter la altegaj rokoj de la famkonata kataluna krutmarbordo.

Kiel ĉiujare, okazis la esperanta ekspozicio de tiu ĉi grupo dum la tagoj de la ĉeffesto de Gràcia. Superflue estas aldoni, ke ĝi ricevis multajn vizitantojn el tiu tradiciema kvartalo de Barcelona, kie multaj simpatias al la esperantista tasko de *el patso.*

— Ankaŭ la senlaca grupo "Nova Sento" laŭdinde imitis sian kunfraton de Gràcia. La laborista kvartalo Poble Nou ankaŭ havis *sian* esperantan ekspozicion dum la ĉeffesto. En la daŭro de du semajnoj oni povis admiri la senriproĉan aranĝon de la citita ekspozicio, kiu altiris multan publikon al la ejo de la strato Llacuna. La efika propaganda agado de tiu grupo certe sukcesigos la anoncitan esperanto-kurson, kies inaŭguro okazos la 16. de oktobro, sub la gvido de nia lerta s-ano. Josep Banet.

— Al la ĉiujara kataluna febro *ĉeffesti,* la esperantistoj respondis nunjare per febro *ekspozicii.* Kaj la grupo "Barcelona Stelo", kiu faris sian *someran dormetadon,* subite revekiĝis kaj organizis esperanto-ekspozicion en sia ejo de la strato Urgell, 180. La ekspozicio daŭros de la 8. ĝis la 15. de okt. La sekvantan tagon, 16-an, oni malfermos kurson, kiun klarigos s-ano. Josep Riera.

*Girona.*—La urbo de nia neforgesita IX. Kataluna Esp. Kongr. reprenas sian antaŭan agadon, dank' al la grupo "Ĝerona Espero" kiu prepraris, imitante aliajn katalunajn urbojn kaj akceptinte instigojn de KEF, Ĉe-kurson prizorgitan de F-ino. E. Pähn.

"La problemo de lingvo internacia: latina, angla aŭ esperanto?" estis la temo de la parolado de Sro. Delfí Dalmau antaŭ 100 aŭskultantoj, dum la 29. de septembro. Kaj dum la 2. de oktobro okazis la provleciono de la Ĉe-profesorino Pähn kun 70 partoprenantoj, el kiuj 34 enskribiĝis por la kurso.

*Terrassa.* — La grupo "Lumon" disvolvis fortan propagandon ĉe la preparado de Ĉe-kurso, kiu okazis de 24. ĝis la 27. de sept. en la ejo de "Orfeó de Terrassa". Artikoloj sur la ĵurnaloj, intervjuoj, prelegoj antaŭ la mikrofono de "Ràdio Terrassa", k. t. p. La kurson sukcese finis antaŭ 35 partoprenintoj F-ino. Elinjo Pähn, kiu de antaŭ 10 monatoj senĉese klarigas Ĉe-metodajn kursojn en Katalunujo.

*Sardanyola. — 46. Datreveno de Esperanto.* Fakte, la "Plena Lernolibro" de Dro. Esperanto aperis dum julio, kvankam la Barcelonaj grupoj festis ĝian datrevenon dum la 24. de septembro, monato kun pli milda varmo ol la julia por pasigi tutan tagon en belega arbaro, kia ja estis *Les Fontetes,* la scenejo de la 46. Datreveno.

La programon de la festo plenigis plej diversaj sportaj ludoj, kaj posttagmeze literatura parto fermis la sukcesintan datrevenan memortagon, kiu, verdire, estis ĉeestata de pli ol 300 personoj.

*Vendrell.* — La loka ĵurnalo "El Baix Penedès", kiu tiel bone subtenis kaj disvastigis la propagandon de nia lasta Kongreso, en sia numero de la 16. de septembro, aperigas krom la kutiman en— kaj priesperantan rubrikon, sciigon pri nia lasta numero dediĉita al Vendrell, la urbo de nia pasinta Kongreso.

*Vic.* — De post junio kaj ĉiusabate, la ĵurnalo "Diari de Vic" regule publikigas priesperantan kolonon, imitinda propagando kiun ni rekomendas al la s-anoj. de ceteraj katalunaj urboj. Ankaŭ sur la bulteno de "Unió Excursionista" oni dediĉas tutan paĝon al teksto en esperanto.

La nova "Esperanta Grupo", kies fondon ni ŝuldas al okazigo de Ĉe-kurso kaj aktivemo de kelkaj lokaj pioniroj, ĉiumonate aranĝas ekskursojn, vizitojn, festojn, k. t. p. Dum aŭgusto okazis vizito al la konata Observatorio de Sro. Josep Pratdesaba, eminenta astronomisto kaj prezidanto de la citita grupo, kies anoj, en nombro de 25, ankaŭ faris ekskurson post kelkaj tagoj al Olot, kie ilin atendis kaj akompanis la anoj de la ĵusfondita grupo "Nova Olota Stelo", nomo kiu bele rememorigas al ni la organizintojn de la Kataluna Esp. Kongr. dum 1913. (J. C.)

Impremta Comercial - València, 234 - Barcelona

A BARCELONA,

# PODEU APRENDRE L'ESPERANTO

EN ELS SEGÜENTS LLOCS:

*Paco kaj Amo*, Planeta, 16. *Barcelona Stelo*, Urgell, 180. *Juneco*, València, 383. *Nova Sento*, Llacuna, 1 (P. N.) *Ateneu Enciclopèdic Popular*, Carme 30. *Acadèmia Espero*, Muntanya, 62. *Universala Frateco*, Passeig Fabra Puig, 35. *Frateco*, Joaquim Valls, 15 (Les Roquetes S. A.) *Ateneu Llibertari del Clot*, Meridiana, 128. *Akademio Laborista Esperanto*, Galileu, 40. *Liceu Dalmau*, València, 245. *B. O. C., Escola Marxista*, Palau, 6. *Amo kaj Libereco*, Mar, 98. *Esperanta Violeto*, Caçador, 4. *Barcelona Esperantisto*, Hospital, 110 (Ateneu d'Esquerra Republicana). *Zamenhof-Instituto*, Sitjas, 3, pral.

ULTRA AQUESTA REVISTA, la

# Federació Esperantista Catalana

té un altre òrgan: El micròfon de

## Ràdio-Associació de Catalunya

Escolteu les nostres emissions quinzenals, que tenen lloc des de comencament d'any.

*Dies d'emissió:* 6 i 20 de novembre, 4 i 8 de desembre. *Hores de l'emissió:* de les 19'15 a les 19'30. *Llargada de l'ona ràdio-telefònica:* 251 metres.

ESPERANTISTES: Col·laboreu i sosteniu la meritosa tasca de **Ràdio-Associació de Catalunya**

**Aviat sortirà el llibre tan esperat!**

# Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

**La millor gramàtica en català de la llengua Esperanto.**

Les entitats i individus que des d'ara prometin la compra de l'esmentat llibre, es beneficiaran d'un 40% de descompte sobre el preu de venda, el qual serà de 3'50 pessetes aproximadament.

**Dirigiu-vos a la Redacció de "Kataluna Esperantisto"**

# *XVII Congres Català d'Esperanto*
# *XVI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj*

20 - 21 - 22 de maig de 1934

## *RIPOLL*

L'incomparable vila comtal serà l'escenari de les nostres vinents diades esperantistes. Cal que Ripoll sigui un nou fogar d'esperantisme.

*SAMIDEANOJ: ASSISTIU-HI!!*